

ESPERANTO-FEDERACIO DE LANGVEDOKO- RUSILJONO

SUDFRANCIA STELO

N° 215 I-AN KVARONJARON 2017

<http://esperanto-languedo-roussillon.fr>

REABONNEMENT

pour recevoir la version papier,
pensez à vous réabonner au tarif
10 euros, tarif qui inclut la coti-
sation à la Fédération à envoyer à
Martine Ragonnet
130 rue A. Alphand
34080 Montpellier
0685363095

Pour la version numérique, coti-
sation à la FD de 2 euros
envoyer à
martine.ragonnet@orange.fr
même adresse pour envoyer vos
idées, articles, photos...

Comité de relecture:
Josée Boccadifuoco
Marie Blanche Fondrillon
Louis Ensuque
Arnaud Lagrange



ENHAVO

P.2 AG

P.3 Jaro Zamenhof

P.4 Festo en Béziers

P.6 En januaro...

P.8 Congrès Eo FR

P.9 Malaperis...

P.10 Grésillon



ZAMENOFA FESTO EN BEZIERS

Ce sfs adopte une nouvelle forme, plus simple certes, mais aussi plus facilement réalisable! nous espérons ainsi tenir les délais. Cependant ce bulletin est le reflet de notre activité, il est la meilleure façon d'échanger nos idées, nos expériences, c'est de cela qu'il se nourrit, il n'existe que si nous faisons vivre nos groupes, la Fédération... En cette année 2017 où l'UNESCO décide d'honorer la mémoire de L. Zamenhof des initiatives multiples sont programées, profitons en pour parler de ce qui nous anime. Au delà de la simple défense de l'espéranto, c'est la langue française qu'il nous faudrait aussi défendre à l'heure où le slogan pour les JO de 2024 s'affiche en anglais sur la tour Eiffel!

m@

PROCHAINE RÉUNION DE LA FÉDÉRATION L.R.

SAMEDI 4 MARS 2017

À PARTIR DE 10H30

MAISON DE LA VIE ASSOCIATIVE

BÉZIERS

*CONVOCATION A L'ASSEMBLEE GENERALE
DE LA FEDERATION D'ESPERANTO DU LANGUEDOC-ROUSILLON*

samedi 4 mars à 10h 30

MVA de Béziers

(rue Gal Marguerite)

En ce début d'année nous souhaitons à tous une très belle année 2017; belle année à notre langue aussi, avec l'occasion particulière de cette année où Zamenhof sera honoré et belle énergie, celle qu'il faut pour faire avancer nos projets.

Ce seront les amis de Béziers qui nous accueilleront et nous nous retrouverons comme d'habitude pour partager le repas, échanger des idées...

Pendant le mois de janvier nous nous sommes réunis en bureau; nous avons quelques idées pour rendre un peu de couleurs à notre fédération, vos idées, votre énergies seront indispensables pour avancer, c'est pour cela que nous espérons vous retrouver nombreux à cette assemblée générale.

Ordre du jour

1. Rapport moral et d'activité, rapport financier, vote.

2. Renouvellement du conseil d'administration (faites nous savoir si vous souhaitez présenter votre candidature), vote.

3. Projets pour 2017 :

idée: un WE à Toulouse (samedi le groupe de Toulouse : fonctionnement, pratiques,...

Dimanche visite de la ville avec des espérantistes...)

Mise à jour du site et comment mieux faire circuler l'information entre les adhérents.

inviter un espérantiste venu d'ailleurs?

SFS et FéDé, une alternative?

4. Divers

Repas partagé

PROCURATION retourner à : Fédération d'Esperanto du Languedoc-Roussillon,

Nom

Prénom

Adresse

Donne procuration à :

jé propose:

Signature

PRI LA JARO ZAMENHOF

KAMPANJO « ZAMENHOF KAJ LABORLINGVOJ EN EU »

Mi memorigas la legantojn ke EEU lanĉis la kampanon, kaj ni invitas ĉiujn landajn asociojn, membrojn de EEU, dum la sekva jaro, organizi laŭeble multajn publikajn eventojn dediĉitajn al Zamenhof, kiel monde grava personeco kaj liaj konceptoj kaj al eŭropa lingva praktiko rilate laborlingvojn en internaciaj kunvenoj.

Nia bulteno aperigos ĉiun kvaronjaron kiom da tiaj aranĝoj okazis en unuopaj landoj kaj fermos la kamanjon la 20-an de decembro 2017 kiam ni proklamos la venkinton.

La kampanjo celas eluzi la du faktojn interesajn por neesperantistoj (Unesko proklamon kaj Briteliron) por disvastigi laŭeble multe, la konscion pri ekzisto de Esperanto kaj ĝiaj potencialoj pri lingva situacio en Eŭropa Unio.

Tio signifas ke ĉiu landa asocio devus inviti siajn societojn, klubojn kaj ankaŭ individuojn organizi en siaj urboj aranĝon publikan pri la supra temo.

Ni ne kalkulas aranĝojn pure por esperantistoj en kiuj nur Esperanto estas uzata.

Ni rekomendas organizi ilin kun iu ŝtata aŭ neregistara organizo ekzemple kun Eŭropaj kluboj, Unesko-kluboj, Urbaj Gvidantaroj sed antaŭ ĉio kun ministerioj pri eŭropaj aferoj, Unesko-Komisionoj, reprezentantoj de Eŭropa Komisiono kaj tiel plu.

Post ĉiu aranĝo la Landa Asocio raportu mallonge al la sekretario de EEU pri ĝi kaj pri tio aperos informo en la marta, junia, septembra kaj decembra EEU-Bulteno.

Fine de la jaro ni nombros la rezultojn kaj proklamos la venkintan Landan Asocion.

La kampanjo ne nur servos al diskonigo de Esperanto, sed ankaŭ por analizi post ĝi diversajn spertojn gravajn por nia estonta laboro:

- kiel volonte aŭ malvolonte aliaj institucioj kunlaboras kun ni,
- kiamaniere reagis la publiko, kiom tiuj aranĝoj helpis por ke pligrandiĝu
- kvanto da E-lernantoj en retaj kursoj, kiujn la kampanjo reklamu
- ktp.

Zlatko Tišljar

Zamenhof-Jaro jam daŭras. Multaj iniciatoj jam okazis. Kiel mi jam informis pasintjare lige kun la Jaro Unesko disponigas specialan logosignon, kiun oni povas utiligi en ĉiaj agadoj ligitaj kun la datreveno solenata sub la aŭspicio de Unesko.

Sekve de nia vizito al la pola Unesko-Komitato pasintsemajne (kun Barbara Despiney) ni ricevis ĝin en kvin lingvaj versioj: Esperanto, krome en la lingvoj pola, angla, franca kaj hispana.

Multaj eventoj jam okazis, multaj aliaj okazas, okazos. Mi kaptas la okazon por memorigi la adreson ĉe kiu la tuta teamo respondecas pri la Jaro Zamenhof atendas informojn pri okazintaĵoj, eventoj aktualaj kaj sekvontaj dum la tuta jaro: zamenhofjaro100@gmail.com.

Barbara

ZAMENHOFA TAGO EN BÉZIERS

La dekan de decembro la geesperantistoj el Béziers kaj Montpellier kunigis por festi la datrevenon de Doktoro Zamenhof.

Ni multe babilis pri la familioj, la vojaĝoj, la staĝoj, la kongresoj, la federacio, SFS, ktp...

Ni faris tion trinkante la matenkafon kaj gustumante la diversajn pladojn preparitaj de la parteprenantojpli, notindas ke ĉiu el tiaj pladoj ŝajni pli gustoplena ol la ceteraj.

Poste, kun plenplenaj stomakoj ni puŝis tablojn ĉe la muroj, instalis seĝojn, komencis la distran parton.




Josée recitis poemon de nia forpasinta amikino Fernande Terral.

Aktorinoj el ambaŭ grupoj interpretis du skeĉojn kie malagrablaj klientinoj tedis vendistinojn sen aĉeti ion ajn. Marie-Blanche legis ĉinan rakonton pri ginsengo, dume Laurence prezentis ilustraĵojn per komputilo sur granda ekrano.

Laurence estis preparinta originalan lecionon pri la korelativoj. Ŝi deziris, ke la ĉeestantaro lernu tiujn malfacilajn vortojn per gestoj. Ŝi estis efika instruistino, ĉiuj atente aŭskultis la klarigojn kaj ridinte sukcesis la gestadon.





Ni rigardis

du videojn : la kamparaj laboroj dum la kvar sezonoj en Aveyron (sed nur aŭtune) kaj la fulmobando (flashmob) kreita de Laurence kun geamikoj cele la UK de Lille (ŝi ne prezentis ĝin dum tiu evento).

Agrabla tago antaŭ la ferioj. Jam la biteranoj pensas pri la printempa kunveno : kie ? kio ? kiam ?

Pri tiu KDisko: (ege interesa!)

André et Paulette Andrieu estis gefiloj de kamparanoj loĝantaj sur la municipo Villeneuve. Kiam ili feruis, ili konstatis ŝanĝojn en la kampara vivo; maŝinoj, novaj kultivaj manieroj aperis, kiuj ofte faciligis la laboron de la kultivistoj.

Por konservi kaj rakonti por siaj nepoj, ili filmis la malnovan labormanieron de la geavoj, onkloj, kaj de la najbaroj. Tiu filmado efektiviĝis dum pluraj jaroj.

André partoprenis okcitanan radioprogramon, kie li prezentis Esperanton. Tie, li renkontis Okcitanajn kaj prezentis sian laboron pri kamparanoj.

Piget (editoro) faris Kdiskon kaj, dum la jaro 2016, la paro Andrieu reklamis surloke pri sia laboro. En tiu KDisko André parolas la okcitanan lingvon sed li postulis subtitulojn en la franca kaj precipe en la esperanta

Tiu KDisko rakontas la kamparan vivon dum la kvara sezono, post la dua mondmilito, sur la okcidenta flanko de Aveyron, nomata « Causse » kun siaj ŝtonaj muroj, kiuj ĉirkaŭas la kampojn. Rimarkindaj estas la gestoj de la partoprenantoj dum ĉiu filmero.

Ne forgesu, ke A. Andrieu estis sciencisto. Li estis kemia inĝeniero. Ni ĉiuj miris, ekzemple, la manieron filmi la panfaradon!

Geneviève



Dum la monato januaro, en Béziers & Montpellier ni disdonis la kalendarojn.....:

« La 10an de januaro Line kaj Laurence distribuis esperantajn kalendarojn ĉe la universitata restoracio en Béziers. La akcepto de junaj gelernantoj kaj preterpasantoj estis afabla kaj kelkaj el ili petis informojn pri la lingvo. Dum nur unu horo ni disdonis 250 kalendarojn. Malgraŭ la malvarmego ni kontentis. »

Laurence



Nia amikino Loulou legis esperantajn infanlibroj



CONGRÈS D'ESPÉRANTO FRANCE

DU 25 AU 28 MAI MANDRES LES ROSES (94)



Francilio plezure bonvenigas la kongreson 2017 de Esperanto-France ĉe la sudoriento de Parizo (25 km), en Val-de-Marne. Dum 4 tagoj, eblos al vi kunveni por interŝanĝi pri la agadoj de niaj asocioj, por ĉeesti prelegojn, por malkovri la departementon kaj por sportumi dank' al multaj aktivecoj partopreneblaj de ĉiuj.

Ĉu vi scias, ke tiu departemento famas pro siaj danctrinkejoj “guinguettes” ĉe la bordo de rivero Marno? Venu por danci kaj aŭskulti muzikbandon el nia regiono dum tipa vesperfesto. Krome pluraj Francilianoj kunhavigos siajn pasiojn per prelegoj, koncertoj, manlaborgrupoj. En 2017 datrevenas la centjariĝo de la forpaso de Zamenhof : jen okazo malkovrigi al vi la riĉecojn de la arĥivoj de la sidejo de la organizantaj asocioj, Esperanto-France kaj la federacio Parizo-Francilio.

Nia kongresejo troviĝas en 6-hektara parko, atingebla per amas-transportrimedoj aŭ per aŭto (surloka parkejo). Ĝia regulado postulas tuttagan pensionon (loĝadon kaj 3 manĝojn). Eblas mendi unuopan manĝon se vi ne dormas en la kongresejo (taga partopreno aŭ tendumado) kaj la ĵaudan tagmanĝon. La dormoĉambroj (4 ĝis 6 litoj - littukoj provizitaj) situantaj ĉe la etaĝo atingeblas per lifto. Kelkaj lokoj disponeblas por tendoj kaj domveturiloj. La dombestoj ne bonvenas ĉe la kongresejo.

Adreso : PEP - 2 chemin du 8 Mai 1945 - 94520 Mandres-les-Roses

Pagaj ekskursoj kun ĉiĉeronado

Vendredo (tuttaga): Vincennes kaj ties reĝa fortika kastelo, ankaŭ eksa malliberejo; la ri-verbordoj ĉe Marno (aŭtobuse - ekiro certa ekde 20 aliĝintoj).

Dimanĉo (posttagmeze): Mundolingua, la muzeo pri lingvoj, en Parizo (transporto per propraj rimedoj)

<http://kongreso2017.esperanto-france.org>

Malfeliĉaj novajoj dum tiu jarkomenco, malaperis 3 amikoj, kiuj dum pluraj jaroj estis aktivaj esperantistoj.

Annick Tora, de la grupo de Montpellier.



Dum pluraj jaroj ŝi estis prezidanto de la grupo (ĉi sube, dum staĝo en Goteborg, kun verda vestaĵo) ŝi partoprenis plurajn kongresojn, kaj kantis kun la Internacia Koruso.



Gilbert Santos kaj Jean Pierre Peray de la grupo de Béziers. (Ambaŭ, sidantaj, unua vico, dum staĝo en la Dragonnière)

Gilbert helpis la grupon, organizis kursojn en Campagnan. Li partoprenis multajn staĝojn kaj la kongreson de Boulogne (2005) kun sia amikino Marie Thérèse Lemaire.

Jean Pierre Peray partoprenis kaj organizis plurajn staĝojn.

Ĉiuj niaj pensoj por tiuj amikoj.

PRINTEMPoS

de la 14-a ĝis la 22-a de Aprilo 2017
en la kastelo Grésillon (Francio)

- * Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj
- * Aktivadoj kaj ekskursoj
- * Seminario AMO (16–20 de Aprilo)
- * Prelegoj kaj atelieroj
- * Trapasu esperanto-ekzamenojn (ILEI)

Aflugu de
Londono
por malpli ol
50€

instruos, gvidos kaj prelegos :



Zsófia
KORODY



Christophe
CHAZAREIN



Marion
QUENU



Mireille
GROSJEAN



Sara
SPANO



Stefan
MacGILL



Se vi deziras lerni Esperanton
se vi deziras trapasi ekzamenon
se vi deziras trejniĝi por instrui Esperanton
aliĝu al PRINTEMPaS AMO 14-a ĝis 22-a de aprilo 2017
antaŭ la 14-a de februaro por pagi malpli
Grava novaĵo : reduktita prezo (duona prezo por kurso kaj manĝo)
por junuloj studentoj senlaboruloj
legu plu en gresillon.org/printempas

Si vous voulez suivre un cours intensif d'espéranto
ou passer un examen ou suivre un entraînement sur l'enseignement de l'espéranto
avec les nouvelles technologies
INSCRIVEZ-VOUS
AVANT LE 14 FEVRIER POUR BENEFICIER DE 10% DE REDUCTION
ATTENTION NOUVEAU :
demi-tarif pour les jeunes, les étudiants et les demandeurs d'emploi (cours et repas)
suite : gresillon.org/printemps

Ĝis baldaŭ en la Esperanto-kastelo Greziljono
kastelo@gresillon.org

